
Gazeto Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

33-a Jarkolekto * Septembro 2019 * N-ro 114

ISSN 1576-0618



TREBUJENA
Lumo en la marsko

Gazeto Andaluzia
Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto.**

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.
IMPRIME: Litopress SL Córdoba


DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ
REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ
COLABORADORES: Alejandro BURGOS ESCALANTE
Vicente HERRERA COBO

ENHAVO

La efiko de la Papilio 3
Esperanto en Andaluzio 6
Propono por Universala Konstitucio 10
La Kordovaj Sonoriloj de la Katedralo de
Santiago-de-Kompostela 13
Lingva Angulo: *ĉirkaŭ* 19
Poezio.....23
Turismi en *"Trebujena"* 24
Paĝoj pri Nia Historio: *Higinio Noja Ruíz*.....29
Flamenko: *"El Piyayo"* 32
Andaluzia Kuirarto 34
Misteroj kaj legendoj de Andaluzio 36
Speciala Krucvortenigmo 38
Rebuso 40
Humuro 41

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

LA EFIKO DE LA PAPILIO




Ĉina proverbo asertas, ke la flugil-batado de papilio estus perceptebla ĉe la kontraŭa flanko de la mondo. Ĉi tiu aserto, kune kun la esploroj de la matematikisto kaj meteologo Edward LORENZ, estas la fundamento de unu el la plej diskonigitaj teorioj en filmoj: *la efiko de la papilio.* Laŭ ĝi, la flugil-batado de papilio en Hong-kongo povas provoki tempeston en Nov-jorko. Tamen, ĉu tio povus vere okazi ?

Tutcerte, perturbo kiu estas malgranda en sia komenco, se ĝi pligrandiĝas post ĉiu ripeto, povus kaŭzi enorman rezulton post kelke da tempo. Tiel, laŭ ĉi tiu fizika teorio, reale nomita *la teorio de la ĥaoso*, sistemo tiel kompleksa kiel la universo estas tute ne-prognozebla. Do, sen-fina ripetado de agoj, inter kiuj unuavide ŝajnas ne ekzisti ligilo, povus provoki ne-antaŭvideblan rezulton.

Imagu du universojn ne diferencigeblaj unu de la alia, se en unu el ili okazus io, kiu unuavide povus esti konsiderata kiel tute ne-grava, ekzemple: la flugil-batado de papilio, tiu universo reakcius laŭ malsimila maniero, do la evoluado de ambaŭ universoj sekvus malsimilajn vojojn. Edward LORENZ, aŭtoro de la teorio de la ĥaoso, asertis, ke la vetera prognozo estas tutklara ekzemplo pri tiu teorio. Li, en la jaro 1963, realigis veterajn kalkulojn laŭ kompleksaj ekvacioj pere de komputilo, pere de tiuj kalkuloj li deziris konstati, ĉu la vetero sekvis regulajn kalkulojn. Dum la maŝino finis tiujn kalkulojn li decidis prepari kafon, do, li ne sekvis la kalkulojn realigatajn de la komputilo dum kelkaj minutoj. Kiam li revenis en la labor-tablon li vidis, ke la rezultoj atingitaj de la komputilo estis tute malsimilaj al tiuj

kiuj vere okazis en la vetero. Kial la komputilo "eraris"? La solvo estis okulfrapa.

Cele la simpligon LORENZ decidis rondigi la kalkulojn per la uzo de nur tri decimaloj post ĉiu nombro, ekzemple: la rapideco de la vento estus 26'786 kmoj/horo anstataŭ la plej ekzakta 26'786954. Tiuj ne-uzitaj decimaloj provokis ŝanĝojn en la rapideco de la vento, ja minimumaj sed ekzistantaj kaj decidaj. Tiel, la rezultoj atingitaj estis tute malsimilaj pro tiuj ne-uzitaj decimaloj, kiuj unua-vide povus ŝajni ne gravaj.



Holivudo jam diskonigis tiun teorion okaze de kelkaj filmoj. En unu el ili, pritraktanta vojaĝojn en la tempo, turistoj en la dinosaŭra epoko estis avertitaj tuŝi nenion dum la vizito al pasinteco. Tamen, unu el tiuj vojaĝantoj prenis kaŝite ekzotan floron en la ĵurasia epoko, kiam li revenis en la nun-tempan epokon, la mondo estis tute malsimila al tiu antaŭe konata, pro la fakto, ke la malapero de tiu simpla floro provokis sinsekvajn ŝanĝojn dum milionoj da jaroj.

Certe vi rajtas opinii, ke ĉi ĉio estas rezulto de la esploradoj de ekstravaganca sciencisto, tute fora de la reala mondo aŭ nur intrigo de holivudaj filmoj. Sed, pripensu jenon: antaŭ kelkaj monatoj, eble unu jaro, iu ĉasis vesperton en Ĉinio kiu poste utilus kiel ekzota manĝaĵo ĉe bazaro. Estas konata, ke vespertoj ne malsaniĝas kiam ili estas infektitaj de kelkaj virusoj, male ĉi besteto povas transmisii tiujn virusojn al homo. Do, antaŭ kelkaj monatoj iu ĉasis vesperton, kiu

poste iu manĝis kaj malsaniĝis. Nun-tempe, kelkaj monatoj post tiu momento, la mondo ŝanĝiĝis pro la fakto, ke iu ĉasis tiun malgrandan mamulon.



Bazaro en Uhano (Ĉinio)

GRAVA INFORMO POR LEGANTOJ

Ĉi tiu 114-a numero de *GAZETO ANDALUZIA* aperas unue interrete. Hispanio kaj multaj aliaj landoj en la mondo travivas malfacilajn monatojn pro la koronviruso COVID-19. La hispana registaro proklamis staton de alarmo en la tuta lando kaj pro tio ni, hispanoj, rajtas resti for niaj hejmoj nur pro tre konkretaj pravigeblaj motivoj. Alie, la presejo kiu ellaboras nian revuon restas malfermita dum ĉi tiuj tagoj, pro tio ni ne povas presi ĉi tiun numeron de nia revuo kaj tiel, ni aperigas ĝin unualoke sur la reto. Espereble, kiam la stato de alarmo malaperos ni sukcesos eldoni ĝin kaj tiel ni dissendos la revuon al ĉiuj membroj de nia asocio kaj simpatiantoj de la internacia lingvo.



ESPERANTO EN ANDALUZIO



➢ Prestiĝa premio ricevita de DAVID GALADÍ.



Nia amiko David GALADÍ ENRÍQUEZ ricevis la prestiĝan premio "Hoag/Robinson" de la *International Dark-Sky Association*. Ĉi tiu usona asocio celas rezervi la ĉielon kontraŭ la luma poluado. En la jaro 2005 David Galadí redaktis teknikan informon, kiu utilis poste por reguligi la luman poluadon en Hispanio.

Temas pri nova forma de poluo, ŝajne malsama al la aliaj, kaŭzita de superabundo kaj intenso de ĉiuspecaj lumoj ĉe stratoj, vojoj, industriejoj, parkoj, ktp. La luma poluo malhelpas al la homoj vidi la stelojn kaj sperti kio estas vera nokto kaj vera lun-lumo. Krome, ĝi estas ege malutila al la agado de la astronomoj.


Laŭ Blanca TROUGHTON, la prezidanto de la FAAE (Hispana Federacio de Astronomiaj Asocioj), *"David Galadí jam laboras de antaŭpli ol dek jaroj en la instruado de novaj astronomiaj amatoroj rilate la purigon de la nokta ĉielo, ĉefe pere de kursoj de li gvidataj pri fonometrio aplikita al la mezurado de la luma poluo. Tiuj kursoj okazas en la observejo de Calar Alto*

(Almerio), tie li laboras. Krome li prelegas ofte pri ĉi tiuj aferoj kaj lia afableco kaj sindediĉo estas okulfrapaj".

La andaluzia esperantistaro nur povas substreki la dirajĵojn de la S-ino Troughton. David Galadí ofte kunlaboras kun nia asocio rilate la okazigon de prelegoj pri astronomiaj aferoj okaze de esperanto-renkontiĝoj en Andaluzio. Krome, David estas la kun-aŭtoro de la libro *"Kosmo kaj ni"*, kiu jam atingis sian trian eldonon, eksterordinara afero okaze de eldonado de libroj en la internacia lingvo.


Do, gratulon DAVID pro tiu internacia agnosko.

- **Mencio pri Esperanto en ĵus eldonita libro en Kordovo.**



La 15-an de marto de la jaro 1919, Rogelio Luque Díaz malfermis libro-vendejon en Kordovo. Cent jarojn poste, tiu vendejo ankoraŭ ekzistas kaj la nuntempa mastro decidis eldoni libreton kun la kunlaboro de la plej gravaj kordovaj historiistoj, pro la fakto ke dum tiuj cent jaroj la libro-vendejo *LUQUE* estis gvido-punkto en la kordova kulturo.

Rogelio Luque estis unu el la plej gravaj esperantistoj en la urbo ĝis la jaro 1936, li estis UEA-delegito en la urbo, sekretario de la Andaluzia Esperanto-Federacio kaj ofta kunlaboranto en la disvastigo de la internacia lingvo en Kordovo. Dum kelkaj jaroj la libro-vendejo mem estis la sidejo de la tiama Grupo de Esperanto de Kordovo.



Bronza statuo de ROGELIO LUQUE
kiu nuntempe trovigâs ĉe honora loko en la libro-vendejo

La libro nun publikigita omaĝe al tiuj cent jaroj de la libro-vendejo havas ankaŭ cent paĝojn. Kompreneble la esperantista movado aperas sur ĝi, ĉefe surbaze de la konitaĵoj havigitaj de J.M. Rodríguez en la ĉapitro dediĉita al la esperanto-agado de Francisko Azorín Izquierdo, eldonita de la Kordova Universitato en la jaro 2005. Tiel, aperas sur la libro ĵus eldonita pri la libro-vendejo *LUQUE*, ke Rogelio Luque partoprenis en kelkaj esperanto-kongresoj okazigitaj en Hispanio, Francio kaj Germanio.


Kiel sciate, Rogelio Luque mortis, pafita, dum la unuaj tagoj de la civitana milito en Hispanio, sub la akuzo esti masonisto kaj vendi librojn pri marksismo kaj naturismo en sia libro-vendejo.

➢ Nova numero de la revuo *VENTO*

Fine de marto aperis la numero 5-a de la revuo *VENTO*, eldonita de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kaj aro da homoj kiuj interesiĝas pri veksilologio, vorto sinomima al tiu pli internacia: "flagoscienco". La revuo nur aperas en interreto kaj ĝi estass senpage alirebla ĉe la TTT-paĝo: www.esperanto.ac/vento

Ene de ĉi tiu 5-a numero aperas interesa studo pri la flagoj aperantaj sur la libro-komiksoj de Tinĉjo, ankaŭ oni parolas pri la origino de la hipia simbolo, pri la flagoj de Germanio, pri la malsimilaj flagoj de la hispanaj respublikoj en Hispanio kaj laste pri la blazono aperanta sur la nikaragva flago. La revuo *VENTO* ricevas pli ol 500 vizitoj, la kvara numero eĉ pli ol mil kaj kvankam la publiko kiun ĝi

celas estas tre konkreta, tiuj kiuj ŝatas flagojn, ĝi estas bona ekzemplo pri la aplikigo de la internacia lingvo al ĉiuj sciencoj kaj stud-objektoj. La revuo aperas tri-foje en la jaro kaj kiel dirite, ĝi estas tute senpaga, do ni invitas al Vi viziti kaj legi ĝin.




aeu

Andaluzia Esperanto - Unuiĝo

Asociación Andaluza de Esperanto

Nia celo: disvastigi la internacian lingvon en Andaluzio

PROPONO POR UNIVERSALA KONSTITUCIO



Prof. D-ro LUIGI FERRAJOLI

Luigi FERRAJOLI estis itala juĝisto kaj nuntempe li estas unu el la plej elstaraj juraj filozofoj en Eŭropo. Li estas aŭtoro de kelkaj verkaĵoj, inter ili lastatempe: *Costituzionalismo oltre lo Stato* (Konstituciismo tras la Ŝtato) 2017 kaj *Manifiesto por la Igualdad* (Manifesto por la Egaleco) 2019.

Ĝuste nun, kiam okazas la koronvirusa pandemio, li defendas, ke la terura ĉiutaga nombro de mortintoj igas necese krei tutmondajn taŭgajn instituciojn por protekti kaj defendi la homaron. FERRAJOLI apogas la ideon aprobi universalan konstitucion, laŭ li, ekzistas problemoj kiel la klimata ŝanĝo, militoj, malŝato, ktp, kiuj ne povas esti solvotaj je nacia nivelo, do estus necesa la adopto de universala leĝaro.

Pro tio, la pasintan 21an de februaro, li proponis en Romo la kreon de universalaj institucioj, kies ĉefa celo estus garantii la homajn rajtojn kaj la pacon. FERRAJOLI laboras pri ĉi tiu temo kaj ĝuste nun, kiam la koronvirusa epidemio provokis milojn da mortintoj en la tuta mondo, estas necese garantii, ke ĉiuj homoj, sendepende de raso aŭ nacio, rajtas ricevi ĉiujn medikamentojn kune kun aliaj neprajoj nomitaj de li: sociaj rajtoj. Li proponas la reformon de internaciaj organizaĵoj kiel la Monda Banko aŭ la Internacia Monunua Fonduso, kune kun la kreo de kelkaj aliaj kiuj garantius tutmonde edukadon, loĝadon, sanon kaj manĝadon. Li ankaŭ proponas la aprobon de impostoj je internacia nivelo, kiel la Tobin-imposto aŭ mon-kontribuoj pro la uzo kaj trouzado de komunaj havaĵoj, tiuj nomata de li "universala havaĵaro", esence la akvo, la nutraĵoj kaj la medikamentoj.

Ĉu eblas pensi, ke ĉi ĉio estas nur utopio? Eble jes, tamen, laŭ opinio de Miguel PASQUAU, profesoro en la Universitato de Granado, temas pri *urĝa utopio.* Se oni diras, ke la propono de Luigi FERRAJOLI estas nur utopio, eble ni emfazos, ke ĝi estas ne-realigebla, tamen se al tiu difino oni aldonas la adjektivon "urĝa", tio eble helpas komprenigi, ke temas pri io realigebla.




Hazarde la alvoko por tiu konstitucio okazis nur kelkaj semajnoj antaŭ la apero de la epidemio en Italio, kvankam tio jam estis problemo en aliaj landoj kiel Ĉinio aŭ en Irano. Ĉi-sence FERRAJOLI elstaras la fakton, ke verŝajne ĉi tiu pandemio montras ke ĉiu ŝtato, eĉ en la unuigita Eŭropo, luktas por defendi sian propran suverenecon rilate la alpropigon por si de medikamentoj kaj saniloj kaj tio malgraŭ la ekzisto de internaciaj organizaĵoj kaj en Eŭropo, eĉ de komuna parlamento kiu ŝajne ludas ne-gravan ludon dum ĉi tiu problemo.

Probable, ni ne povas imagi la adopton de universala konstitucio kie ĉiuj resursoj estas garantiotaj por la tuta homaro, tamen la monda situacio kiun ni travivas nuntempe ankaŭ estis ne-imagebla nur antaŭ kelkaj monatoj. Do, nenio pli utila ol urĝeco por helpi detrui murojn kiuj antaŭe ŝajnis fortaj kaj ne-venkeblaj.

Tamen la alvoko de FERRAJOLI trovas seriozan problemon. Li konsideras, ke la ĉefa rolo por tiu jura reformo je universala nivelo

devas esti ludata de la registaroj kaj de la ŝtatoj, kaj ni ĉiuj scias, ke tiaj ŝanĝoj devus esti realigataj de homoj kaj ne de institucioj. Ĉi tiu universala konstitucio ne naskiĝos post inter-registaraj diskutoj aŭ post ŝtataj akordoj, male, se tiu urĝa utopio pri universala konstitucio iam realiĝas, tio ŝuldiĝus al la volonteco kaj agado de la plej subaj aktoroj en ĉi tiu scenejo: la homoj. Kaj kvankam FERRAJOLI eĉ ne mencias tion, ne eblas kompreno inter homoj se ni ne disponas pri lingvo kiu helpos interkomprenigi nin je la sama nivelo, neniam unu super la aliaj, nek homoj, nek ŝtatoj, nek kulturoj.



Lastmomenta informo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Laŭ decido de la Estraro de Andaluzia Esperanto, dum la kuranta jaro 2020 ne okazos Andaluzia Kongreso de Esperanto. La prokrastigo de la Hispana Kongreso ĝis la monato oktobro pro la koronvirusa epidemio kaj la nuntempa stato de alarmo en Hispanio, devigas al ni ankaŭ prokrastigi nian jaran renkontiĝon ĝis la venonta jaro 2021.

Do, ni instigas ĉiujn andaluziajn esperantistojn ĉeesti la Hispanan Kongreson de Esperanto, okazonta en Comillas (Santandero) de la 9-a ĝis la 13-a de oktobro. Pliaj informoj ĉe: www.esperanto.es/kantea

LA KORDOVAJ SONORILOJ DE LA KATEDRALO DE SANTIAGO-DE-KOMPOSTELO




المنصور (Almanzoro)
930 - 1002

Lia vera nomo estis *Abi Amir Muhammad*, tamen li baldaŭ estis konata kiel *Al Mansur bi Allah*, "tiu kiu ricevas de Dio la venkon". Lia nomo, kastiligita estas *Almanzor*. Li ne estis membro de la kortego de la kalifo *Al-Hakam* la 2-a, do li devis atingi unue militistan prestiĝon antaŭ ol esti akceptata ene de la konsilantaro de la kalifo. Almanzor transformis la kordovan armeon, li enirigis en la al-andalusian truparon 20.000 nord-afrikajn berbereojn, tiel li kreis fortan armeon kapabla lukti sukcese kontraŭ kastilianoj kaj aragonanoj.

Malgraŭ tio Almanzor ne estis nur militisto, li ankaŭ estis habila diplomato kiu subskribis akordojn kaj aliancojn kun aliaj regnoj de la Ibera Duoninsulo. Tiel, li de tempo al tempo paktis kun kristanaj reĝoj pacajn epokojn kontraŭ pago de impostoj.

En la jaro 973 Almanzor devis iri en la nordon de Afrikon por sufoki ribelon, tion profitis la Leona reĝo Bermudo la 2a por nuligi pagon de imposto al la kordova kalifejo. La respondo de Almanzor estis rapida kaj terura, li profitis tiun ne-plenumon de akordo fare de kristana reĝo por bati la Leonan regno-landon kaj ankaŭ la koron de la kristana

religio en la Ibera Duoninsulo: la urbo Santiago-de-Kompostelo. En la monato julio 997 li decidis enmarŝi kun inmensa armeo en Santiago-de-Kompostelon. En tiu urbo troviĝis la plej grava sanktejo de la kristana kredo en la Ibera Duoninsulo, la tombo de la apostolo Ĵakvo, la tieaj pilgrimadoj el ĉiuj eŭropaj regionoj estis similaj al tiuj kiuj celis la urbon Mekkon por islamanoj.



Laŭ tradicio, ene de ĉi tiu kofro, en la katedralo de Santiago, ripozas la restaĵoj de la Apostolo Ĵakvo.

Laŭ tradiciaj rakontoj, la apostolo Ĵakvo disvastigis la kristanan kredon en la Ibera Duoninsulo. Post lia morto en Palestino, kelkaj kunuloj decidis porti la restaĵojn de la apostolo en Galegion. Ĉi tiu sanktulo krome, estis la inspiro de kristanaj soldatoj en iliaj bataloj kontraŭ la islamanoj.

Neniu islama kalifo aŭ militestro kuraĝis iam ataki tiun urbon, ĉefe pro la longa distanco ekzistanta inter Kordovo kaj Santiago-de-Kompostelo. Tamen, Almanzor komprenis, ke atako al tiu grava kristana sanktejo estus granda venko por la kalifejo, krome, li ankaŭ profitis la fakton, ke multaj kristanaj nobeloj de la Leona regno-lando estis kontraŭaj al la reĝo Bermudo la 2-a kaj sendube la kordova militestro ricevus ties helpon.

La militista ekspedicio eliris el Kordovo en la monato julio 997, ili eniris en Ekstremaduron kaj ĝisradike oni detruis la urbon *Coria*. Poste ili marŝis en *Viseu*, nuntempe portugala urbo, tie la islamanoj renkontiĝis kun leonaj trupoj kontraŭaj al la reĝo Bermudo la 2-a. Almanzor planis tre habile sian strategion rilate la atakon al Santiago. Li aranĝis ŝiparon en *Alcaçar do Salo* por transporti soldatojn, armilojn kaj nutraĵojn. La ŝipoj eniris en la riveron Doŭron kaj tie okazis renkontiĝo kun pliaj trupoj venitaj el Kordovo.

Dum la marŝado ili detruis kaj disrabis ĉion, la kristanoj asertis tiam ke tio estis jam la komenco de la Apokalipso, prognozita de iuj por la baldaŭa jaro 1.000. Post detrui la urbon *Padron* la armeo de Almanzor eniris en Santiago-de-Kompostelo la 10-a de aŭgusto de la jaro 997, apenaŭ unu monato daŭris tiu militista marŝado kiu kelkaj historiistoj konsideris simila al tiuj kampanjoj de Aleksandro la Granda aŭ Kaesaro en Gaŭlio.

Ĉiuj enloĝantoj antaŭe forlasis la urbon, do, la islamanoj sukcesis eniri en la urbon sen-lukte. Ili detruis la muregojn kaj bruligis domojn, preĝejojn kaj palacojn. Tamen, Almanzor ordonis ne tuŝi la tombejon de la apostolo Ĵakvo, *Yaqub* por la islama religio. Kompreneble ili disrabis ĉiujn juvelojn kaj arĝentaĵojn kiujn ili trovis en la ĉefa preĝejo, sed, la plej alt-valora milit-akiro estus io tre simpla: la sonoriloj de tiu preĝejo.

Almanzor deziris uzi tiujn sonorilojn kiel oleo-lampojn en la kordova moskeo, same li deŝiris la lignaĵojn de tiu preĝejo por esti uzata poste, okaze de la pligrandigo de la moskeo de Kordovo. La soldatoj de Almanzor poste revenis en Kordovon kun siaj akiroj.



Tamen, la militaj sukcesoj de la kordova militestro ne havis grandajn rezultojn el la teritoria vid-punkto, ĉar li apenaŭ pligrandigis la islamajn land-limojn en la Ibera Duon-insulo kaj li ne povis eviti la ruinigon de la kalif-regno. Almanzor mortis en la jaro 1002 kaj malgraŭ la fakto, ke lia filaro pruvis daŭrigi la militistajn agadojn de lia patro, ili tute ne sukcesis.

Kaj kio okazis rilate la sonorilojn? Nu, verdire ili utilis kiel oleo-lampoj en la kordova moskeo. Kiam la kastilia reĝo Ferdinando la 3-a konkeris Kordovon en la jaro 1236, la historio rakontas, vere aŭ ne, ke la reĝo ordonis resendi la sonorilojn en Santiago-de-Kompostelon. Do, la tradicio diras, ke islamaj malliberigitoj transportis la sonorilojn en la novan preĝejon konstruitan por gardi la tombon de la apostolo Ĵakvo en la galega ĉefurbo.




La historio rakontas, ke la sonorilojn revenigis en Santiago la kastilia reĝo Ferdinando la 3-a, post la kristana konkero de Kordovo.

Estas necese diri, ke la historio kaj la artistoj troigis la aferon. Tiu unua preĝejo konstruita en Santiago-de-Kompostelo kaj poste detruita de Almanzor, ne estis simila al la nuntempa impona katedralo. Male, temis pri malgranda baziliko, supozeble, do, ankaŭ la sonoriloj ne estus tre grandaj, pripensu, ke en Kordovo ili utilis kiel simplaj oleo-lampoj. Laŭdire temis pri 11 sonoriloj malgrandaj. La ceteraj sonoriloj ankaŭ prirabaitaj de Almanzor dum liaj milit-agadoj estis fanditaj kaj ankaŭ senditaj al Santiago-de-Kompostelo.


Ĉu tiuj sonoriloj estas uzataj nuntempe? Nu, dum la rekonstruo de la katedralo de Santiago en la 16-a jarcento oni starigis novan turon, hodiaŭ konata kiel turo de la horloĝo aŭ turo *Berenguela.* Ĉi turo bezonis grandan sonorilon, tiel, oni fandis ĉiujn sonorilojn havigitajn el

Kordovo por konstrui la "sonorilon *Berenguela*" pezanta 6.433 kilogramojn. Tiu sonorilo troviĝas nuntempe ĉe la klostro de la katedralo, ĉar nova sonorilo konstruita en Nederlando funkcias hodiaŭ en tiu turo.





La sonorilo *Berenguela* en la Katedralo de Santiago



Andaluzio...
lando plena de Historio

ALIĜU AL
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: cordoba@esperanto.ac
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe la jena konto:

- BANKIA

ES80 0487 3225 1420 0000 6979

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2020

HAZTE SOCIO DE LA
Asociación Andaluza de Esperanto

Si deseas colaborar en la difusión de la lengua internacional en Andalucía, aquí tienes tu asociación.

Para hacerse socio contacta con: cordoba@esperanto.ac
Cuota anual: 20 € que se pueden abonar en la cuenta siguiente:

- BANKIA


ES80 0487 3225 1420 0000 6979

Cuando pagues por favor informa de los siguientes datos:

- Nombre del nuevo socio.
- Concepto: Cuota 2020

Lingva Angulo

ĈIRKAŬ



Ĉirkaŭ estas prepozicio signifanta jenon:

- En la spaco ronde kuŝanta ĉiuflanke de io.
- En la spaco proksima al io.
- Proksime en tempo.
- Proksime en kvanto.

Do, *ĉirkaŭ* montras pozicion ĉiuflanke de io, ni imagu rondan lokon kies centro estus la pozicio de tio pri kio ni parolas. Tamen, kiel asertas Bertilo Wennergren en *"Plena Manlibro de Esperanto Gramatiko"*, oni devas rifuzi la ideon pri rondforma pozicio, kvankam verdire tio kio troviĝas ĉirkaŭ io havas, pli malpli, rondan formon. Ni vidu kelkajn ekzemplojn:

- La sportistoj staris ĉirkaŭ la trajnisto por pli bone aŭskulti lin.
  Los deportistas estaban de pie alrededor del entrador para escucharle mejor.

- La fianĉino ĵetis siajn brakojn ĉirkaŭ la kolon de la amato.
  La novia arrojó sus brazos alrededor del cuello del amado.

- La pentraĵo de Leonardo da Vinci altiras la atenton de la publiko ĉirkaŭ ĝi.
  El cuadro de Leonardo da Vinci atrae la atención del público a su alrededor.

- La tero rondiras ĉirkaŭ la suno.
  La Tierra gira alrededor del sol.

- La rivero serpentumas ĉirkaŭ la ĝardeno.
  El río serpentea alrededor del jardín.

Ĉirkaŭ ankaŭ povas signifi "proksimuman tempon", antaŭ aŭ post tiu tempo-punkto pri kiu ni parolas, ekzemple:

- Ŝi venos morgaŭ ĉe mi, ĉirkaŭ la 2-a vespere.
  Ella vendrá mañana a mi casa, alrededor de las 2 de la tarde.

- Ĉirkaŭ la mezo de la jarcento finiĝis la milito.
  Alrededor de la mitad del siglo finalizó la guerra.

Ĉi tiu proksimeco ankaŭ povas esti uzata rilate nombro-vortojn.

- La libro kostas ĉirkaŭ 10 eŭroj, tio povas esti 9 aŭ 11.
  El libro cuesta alrededor de 10 euros, eso puede ser 9 u 11.

Kiel post kelkaj prepozicioj, la akuzativa formo povas esti uzata nur kiel direkta rol-montrilon, ni memoru la jam uzitan ekzemplon:

- La fianĉino ĵetis siajn brakojn ĉirkaŭ la kolon de la amato.
  La novia arrojó sus brazos alrededor del cuello del amado.

Do, la brakoj de la fianĉino estis ĵetitaj, tio montras movon, kaj ties celo estis la kolo de la amato.

Sur la bazo de la prepozicio *ĉirkaŭ* oni povas formi pliajn vortojn, jen kelkaj:

- **Ĉirkaŭa**: adjektivo por montri ke tio troviĝas ĉirkaŭ io.

  Mi loĝas en Hispanio kaj mi jam vizitis ĉiujn ĉirkaŭajan landojn.
  Yo vivo en España y ya he visitado todos los países de alrededor.
  Tio estas: ĉiuj landoj kiuj troviĝas ĉirkaŭ Hispanio.

- **Ĉirkaŭe:** ĉiuflanke de io.

  Kiam li ellitiĝis, ĉirkaŭe li trovis agrablan ĉambron.

Cuando se levantó a su alrededor encontró una habitación agradable.

- **Ĉirkaŭi:** esti en la ĉirkaŭa pozicio, iri en pozicion ĉirkaŭan.

  La rivero ĉirkaŭas la tutan ter-pecon.
  El río rodea toda la finca.

- **Ĉirkaŭigi:** kovri ĉiuflanke.

  La polico ordonis ĉirkaŭigi la tutan prizonon por eviti fuĝojn.
  La policía ordenó rodear toda la prisión para evitar fugas.

- **Ĉirkaŭaĵo:** tio kio troviĝas ĉirkaŭ io.

  Mi havas bonan gvidlibron pri Granado kaj ĉirkaŭaĵoj.
  Tengo una buena guía sobre Granada y alrededores.

Ankaŭ esas eble trovi la prepozicion *ĉirkaŭ* unuigita al aliaj vortojn por formi aliajn. Ni vidu kelkajn ekzemplojn:

- **Ĉirkaŭiri:** moviĝi ĉirkaŭ iu aŭ io, farante rondan linion.
- **Ĉirkaŭmano** aŭ **ĉirkaŭmanaĵo**: ornamaĵo portata ĉirkaŭ manradiko aŭ brako.
- **Ĉirkaŭpreni:** preni, metante la manon ĉirkaŭ.
- **Ĉirkaŭskribi:** marki limon ĉirkaŭ skribaĵo.

ESPERANTO

FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

KantEA



ATENTU !

Kantabra Esperanto-Asocio kaj Hispana Esperanto Federacio informas, ke pro la nuntempa koronvirusa epidemio, kiu provokis la aprobon de stato de alarmo fare de la hispana registaro, la 79-a Hispana Kongreso de Esperanto, unuamomente okazigota fine de la monato aprilo, prokrastiĝas ĝis la monato oktobro, ĝuste de la 9-a ĝis la 13-a de oktobro.

Pliaj informoj kaj aliĝilo ĉe: https://www.esperanto.es/kantea

P O E Z I O


Luis de GÓNGORA estis kordova poeto (1561-1627), li estas unu el la tri plej famaj hispanaj poetoj en la 17-a jarcento kune kun Lope de Vega kaj Francisco de Quevedo, en la nomata Hispana ora epoko. Góngora estis la plej grava reprezentanto de la poezia stilo preciozismo, kiu ludis per lingvaĵoj, tio estas: klerega vorttrezoro, mitologiaj aŭ klasikaj alduoj, nekutima frazordo, imagoj, ktp.

Dum viaj haroj, kiel or' radia,
triumfas super suno de mateno;
dum via ĉarma frunto en ĝardeno
fiere blankas super blank' lilia;

dum via buŝo tenta kaj magia
rigardojn sorĉas pli ol jasmeno,
kaj dum per freŝo vengas, kun senĝeno,
eburon glatan via kol' gracia;

ĝuadu haroj, kolo, frunto, buŝo,
antaŭ ol, kio estas en junaĝo
jasmen', eburo, oro kaj lilio,

fariĝos viol-grizo tra l'vizaĝo
kaj, kun la tuta korpo jam en kuŝo,
polvo, vaporo, ombro kaj nenio.



Luis de Góngora y Argote

Tradukis Fernando DE DIEGO.

Turismi en ... TREBUJENA (Kadizo)

Antaŭ ol komenci paroli pri la kadiza vilaĝo *Trebujena* (prononcu: "trebuhena"), celo de nia hodiaŭa vizito, estas necese korekti okulfrapan eraron kiu estis eble vidi sur la pasinta numero. Ene de ĝi oni parolis pri la onuba vilaĝo Nerva kaj ene de la artikolo ĉiam aperis la enkadrigo de Nerva en la onuba provinco, tamen sur la frontispico de la artikolo oni diris *"NERVA (Malago)"*. Evidente ni eroris kaj pro tio ni pardonpetas. Do, utilu ĉi tiu unuaj linioj por diri, ke, kompreneble, NERVA estas vizitinda vilaĝo de la ONUBA PROVINCO.

Nu, kiel dirite, ĉi-numere ni parolos pri Trebujena, belega vilaĝo en la nordo de la kadiza provinco, tuj apud la sevila provinco. Ĝi troviĝas ĝuste inter Jerezo, Sanlúcar de Barrameda kaj Lebrija. Antaŭ la definitiva nomo "Trebujena" la loko estis konata pere de malsimilaj nomoj: *Tarbos, Colobona, Tarbissana, Tarbuxena, Terra Buxena,* ĉiuj ili havas fenican, grekan, latina, araban aŭ kastilian devenon, tio pruvas la antikvan fondiĝon de la vilaĝo.




Blazono de TREBUJENA

Verŝajne, la vorto "Trebujena" devenas de la nomo de la latina familio *Trebecio,* al ili apartenis tiujn ter-pecojn, kiuj pro tio ricevis la nomon "*Trebeciana",* kun tiu nomo oni trovis kelkajn amforojn por oleo produktitaj en la zono. Kvankam antaŭ la alveno de la romianoj tutcerte jam popoloj dum la Bronza Epoko sidejis en tiu zono, tiel oni eltrovis groton uzata kiel tombejo en tiu epoko.

Kiam la islamanoj konkeris la Iberan Duoninsulon ili nomigis la vilaĝon kiel "Tarbaŝana", en la 12-a jarcento la araba

geografto *Al Idris* menciis en sia verkaro riveran havenon inter Alheciro kaj Sevilo, sendube temis pri ĉi tiu urbo.



La fino de la rivero Gvadalkiviro ŝanĝiĝis el la geografia vid-punkto dum la lastaj du mil jaroj. Kiam la romianoj okupis la Iberan Duoninsulon la rivero finiĝis en la *Lacus Ligustinus,* ne rekte en la Oceano Atlantiko. Iom post iom, tiu lago sekiĝis kaj la tero okupis tiun lokon. La vilaĝo Trebujena aŭ pli bone dirite, la romia *Trebeciana*, situis flanke de tiu lago. Vidu nigran cirklon sur la mapo.

En la jaro 1250 la reĝo Ferdinando la 3-a akiris la vilaĝon sen-lukte, dank'al paca submeto de kelkaj vilaĝoj post la konkero de la Sevila regno-lando en la jaro 1248. La kastilia reĝo Ferdinando la 4-a donacis la vilaĝon al Sinjoro de *Sanlúcar*, vilaĝo el kiu municipe sendependiĝis Trebujena nur en la jaro 1494.

Dum la sekvantaj jarcentoj Trebujena estis tipa ter-kultura vilaĝo kie cerealoj kaj viv-oleo estis la ĉefaj produktoj kaj viv-rimedoj. Dum la unua duono de la pasinta jarcento ekzistis tie, kaj en apudaj zonoj, forta maldekstrema movado, tiel dum la inter-civitana milito la persekutado kontraŭ respublikanoj kaj ĝenerale kontraŭ maldekstruloj estis terura, kun pli ol cent mortpafitoj. Post la milito kaj ĉefe dum la


60 kaj 70 jaroj de la pasinta jarcento la enloĝantaro malpliiĝis pro la migrado en industriajn zonojn de Hispanio, ĉefe Madrido kaj Barcelono kaj eĉ al aliaj eŭropaj landoj, kiel Germanio, Belgio kaj Svisio.

La ter-kulturado daŭre estas la ĉefa viv-rimedo de Trebujena, ĉefe ceraloj, oliv-oleo kaj ankaŭ produktado de vino, tie oni rikoltas vin-berojn kiuj poste estos uzataj en Jerezo por ellabori la mondfaman ŝerean vinon. Kiel kuriozaĵo oni povas diri, ke la marska zono de Trebujena estis la loko elektita de la usona reĝisoro Steven Spielberg por la filmo "*Empire of Sun*" (Imperio de l'Suno) de la jaro 1987.



La vilaĝo Trebujena pruntedonis sian naturan scenaron por la filmo *Empire of Sun* de Steven Spielberg.


Monumentoj



Kastelo de Guzmán el Bueno

Temas pri malgranda fortreso ĉirkaŭigita nuntempe de privataj konstruaĵoj, do ne videbla en la pinto de monto kiel multaj aliaj kasteloj. La islamanoj starigis ĝin dum la 13-a jarcento.

Kampar-domo de *Alventus*



Ĉi tiu kampara domo stariĝas sur antikva romia haveno apud la rivero Gvadalkiviro. Oni devas averti, ke la rivero Gvadalkiviro tiutempe estis tre uzita komunik-linio inter Sevilo kaj la Atlantika Oceano por sendi cerealojn kaj oliv-oleon al Romio. Tie troviĝis multnombraj arkeologiaj restaĵoj.

Vent-muelejo

Konstruita dum la 16a jarcento laŭ araba stilo. Ĉi tiu muelejo troviĝas en la pinto de la Monteto de la *Dehesa.* Ene de ĝi oni muelis cerealojn.



Preĝejo *La Purísima Concepción*

Ĝi estas la plej granda preĝejo en Trebujena. Starigita dum la 17a jarcento, oni diras, ke ĝi estis konstruita sur alia islama templo. La pordego de "*El Perdón*" de la jaro 1620 estas belega.

Festoj

Eĉ dum la jaroj kiam ĝi estis preskaŭ malpermesita oni festis karnavalon en Trebujena. Tiam, la *komparsoj* iras tra la stratoj kun siaj pipraj kantaĵoj. La festoj finiĝas per la bruligo de la sorĉistino *Piti*, kiu estas la simbolo de la karnavalo en la kadiza provinco.



Sorĉistino *PITI* en Trebujena

En la monato aŭgusto okazas tipa andaluzia foiro honore al la Virgulino de *Palomares*. Centoj da homoj kiuj iam elmigris por labori en aliajn lokojn de Hispanio kaj en la eksterlando revenas dum tiuj tagoj en la vilaĝon.

La 6an de decembro okazas la gastronomia kaj vina festo. Tiam oni preparas sub la libera ĉielo la plej tipan manĝaĵon de Trebujena: "*garbanzos como conejo*" (kirkoj kiel kuniklaĵo). Ankaŭ okazas konkuro por elekti la plej bonan "junan vinon" kun la partopreno de vin-kelejoj de la vilaĝo.

Gastronomio

Angilidoj fiŝ-kaptitaj en la apuda rivero Gvadalkiviro, kuiritaj kun ajlo kaj pimento, estas tipa manĝaĵo en Trebujena, tamen la plej tipa kuiraĵo estas *"Garbanzos como conejo"* (Kikeroj kiel kuniklaĵo) - vidu paĝon 34an-. Temas pri stufaĵo tre simila al kuniklaĵo...sed sen kuniklaĵo, pro tio la nomo. La vino ankaŭ estas tre bongusta, ĉefe la juna vino, kiu apenaŭ estas unujara, ĝi estas ellaborita en la vin-keloj de Trebujena.

Venont-numere TURISMI EN ...BELALCAZAR
(Kordovo)

Paĝoj pri Nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

Higinio Noja Ruíz

Onubano, instruisto, anarkisto kaj esperantisto

Higinio NOJA RUÍZ naskiĝis en Nerva (Onubo) en la jaro 1896. Lia patro estis kemiisto en la min-entrepreno *Riotinto Company Ltd.* kiu ekspluatis la mineralajn resursojn de la Riotinta regiono en la nordo de Onubo. Je sia 12-a vivojaro li forlasis la lernejon kaj li komencis labori en la kupraj minejoj.



Higinio Noja Ruíz
1896 - 1972

En la jaro 1913 li aktive organizis strikon en la minejo kaj pro tio la entrepreno maldungis lin. Tiam, 17-jaraĝa li komencis studi en la Por-instrua Lernejo, samtempe li ekkunlaboris en la anarkisma ĵurnalaro kun la pseŭdonimo *"Fructuoso Vidal"*. En la jaro 1914 aperas lia unua romaneto *"Mi único amor"* (Mia sola amo), ene de libro-kolekto "La Biblioteca del Obrero de Sevilla" (La biblioteko de la sevila laboristo). En tiu sama jaro li vojaĝas en Barcelonon, tie li konktaktis kun elstaraj anarkistoj kaj li plene implikiĝas en la anarkisma movado. Li daŭre interesiĝis pri sociaj aferoj, tiel en la jaro 1915 li dediĉis artikolojn kaj eseojn al la virina movado kaj al la neceso havigi edukadon al la laboristaro.

Jam 20-jaraĝa li estis instruisto, ĵurnalisto, ofta preleganto, verkisto kaj eseisto. En la jaro 1918 li estis la direktoro de la anarkisma ĵurnalo de Onubo *"Vía Libre"* (Libera Trako). En tiu sama jaro li iris en la nordon de la provinco Kordovo, tie li laboris kiel instruisto en la

vilaĝo *Peñarroya-Pueblonuevo* meze de la valo de la rivero Guadiato, zono plena de minejoj kie la laborista movado estis fortega. En la vilaĝo Peñarroya li kreis lernejon en sia propra hejmo, tie la instruado de la lingvo Esperanto estis unu el la ĉefaj stud-objektoj. Ankoraŭ hodiaŭ kelkaj maljunuloj memoras tiun lernejon kie ĉeestis ne nur infanoj sed ankaŭ plenkreskuloj por lerni la internacian lingvon.




Higinio Noja Ruíz kiel instruisto en Peñarroya-Pueblonuevo (Kordovo)

Dum tiuj jaroj li ofte verkis en ĵurnaloj artikolojn pri liberacana komunismo, kiu, laŭ li, devus pligrandigi la ekonomian produktadon kaj favorigi samtempe la homan liberecon. Li ankaŭ verkis eseojn pri la forigo de la ŝtato kaj la kapitalismo, kune kun la favorigo de la kolektivigo de la privataj proprajĵoj.

Meze de la 20-a jardeko li iris en Valencion kiel instruisto en la kvartalo *El Cabañal* kaj ankaŭ en la vilaĝo *Alginet*. Tie li fondis kamparan lernejon kaj li sekvis la metodojn de la movado "Moderna Lernejo". Dum tiuj jaroj por eviti la persekutadon de la diktaduro de Primo de Rivera, li ŝanĝis sian nomon per "*José López Herrero*", tiel li kaŝite vojaĝis en Barcelonon kaj Parizon, li eĉ partooprenis en Valencio en la jaro 1927 en la fondiĝo de la *Federación Anarquista Ibérica* (Ibera Anarkista Federacio).

Post mallonga restado en Balearoj li denove iris en Valencion. Kiam oni proklamas la respublikon en Hispanio li kunlaboris kun aro da eseoj publikigitaj en Valencio dank'al la eldonejo *Estudio*. Ene de tiuj eseoj li parolis pri anarkismo, kontraŭ-militismo, liberigo de la virinoj, laikismo, ateismo, junularo kaj edukado. Dum la civitana milito li interesiĝis pri ekonomiaj aferoj kaj ĉefe pri laboristaj

kolektivoj , dum tiuj jaroj li ankaŭ estis la direktoro de la revuo *"Semáforo"* (Trafik-lumo). Kiam la milito finiĝis li estis arestata en Alakanto, tie li estis dum kvar jaroj malliberigita en la kastelo *"Santa Bárbara"*. Post lia liberigo li daŭre verkis eseojn kaj artikolojn, tamen li povis publikigi neniun el ili, tiel inter la anarkisma movado ekziliita oni pensis, ke li mortis en la prizono. Li povis vivi post la liberigo dank'al privataj lecionoj de li aranĝitaj. Li mortis en Valencio en la jaro 1972. La vilaĝo *Alginet* kaj ankaŭ la urbo Valencio dediĉis al li straton kaj nuntempe ĉiuj seriozaj studoj pri la anarkismo en Hispanio mencias la nomon de Higinio Noja Ruíz, onubano kiu komprenis, ke la liberito de la laboristaro nepre devas havi esperanton kiel studendan ĉapitron.



Strato "HIGINIO NOJA" en Alginet (Valencio)

Historia Arĥivo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Apartado de Correos 611
14080 Córdoba ~ cordoba@esperanto.ac

F L A M E N K O

El Piyayo

Rafael FLORES NIETO *"El Piyayo"* (prononcu: *El Pijajo)* estis malaga cigana flamenka kantisto, kies travivaĵoj troviĝas inter realo kaj fabelo. Li naskiĝis en la tipa malaga kvartalo *El Perchel* (pron. *El Perĉel*) en la jaro 1855. Laŭdire li elmigris en Kubon, tie, oni diras, li luktis kaj eĉ estis malliberigita okaze de la liberiga milito de la kariba insulo. Tutcerte tion oni ne povas scii, tamen tekstoj de multaj el liaj kantaĵoj parolas pri prizonoj kaj malliberigitoj, krome sendube la plej konata kant-stilo de *El Piyayo* estis la gŭaĥiro, flamenka stilo devenanta el kantaĵo kun tiu sama nomo de la insulo Kubo.



Rafael Flores Nieto
El Piyayo
Malago 1855 - 1940

Reveninte en Malagon komence de la 20-a jarcento li famis en Malago ne nur kiel flamenka kantisto sed ankaŭ pro la fakto ke li estis ofta surstrata vendisto.


El Piyayo kantis tangojn kun klara influo de gŭaĥiro kaj kacer-kantaĵoj, fakuloj pri flamenko asertas, ke li eĉ kreis propran stilon: *"la kantaĵoj de El Piyayo"*. Li mortis en la jaro 1940 ene de remizo el lignaĵo kie li malriĉe loĝis apud sia kunulino. *El Piyayo*, krom kantisto, estis populara malaga ulo post fama poemo, dediĉita al li de la malaga verkisto Jose Carlos de Luna sub la titolo *"Ĉu vi konas El Piyayo?"*. En tiu poemo Rafael Flores Nieto estas prezentata kiel maljunulo nigreta, maldika, malgranda, kverelema kaj fava kiu almozpetas per tangoj kaj malbenas per fandangoj.

Kiel dirite, ĉion kion ni scias pri *El Piyayo* estas duon-vera kaj duon-fabela, eĉ oni povus aserti, ke li mem estis legendo. Verŝajne la plej certa afero estas, ke Rafael Flores Nieto estis tipa malaga ulo kiu ankoraŭ troviĝas en la memoro de la urbo mem, ĉar mitoj neniam mortas.

Prizonulo dekalkulas tagojn,
Malliberigito la jarojn
Kaj ekzekutoto horojn
Minutojn kaj kvaronojn.

En Malago gardistoj nokte
Trairas la urbon kun jena krio:
Dormu tiu kiu volas dormi,
Mi vekos neniun.

Rivero serĉas sian vojon
Kaj hirundoj sian neston,
Virino kiu vivdiniĝis
Ankaŭ serĉas edzon.




ANDALUZIA KUIRARTO

"Garbanzos como conejo"

(Kikeroj kiel kuniklaĵo)

Stranga nomo por ĉi tiu recepto, ĉu ne? Ne temas pri kikeroj KUN kuniklaĵo, sed kikeroj KIEL kuniklaĵo. Pro la nomo mem, oni jam komprenas, ke ene de ĉi tiu recepto vi ne trovos kuniklaĵon. Sendube, la origino de ĉi tiu manĝaĵo troviĝas en tiuj popularaj receptoj kun ne tro riĉaj ingredientoj, sed kun la deziro aspekti riĉa manĝaĵo. Evidente tiuj receptoj kie aperis kuniklaĵo, aŭ kiu ajn alia viando, en pasintaj tempoj ne estis por malriĉuloj. Temas pri manĝaĵo tipa de la vilaĝo Trebujena kaj la 6-a de decembro okazas tie festo kiaj tiam estas eble manĝi kikerojn kiel kuniklaĵo, apud juna vino, ene de agrabla etoso.

<u>Jen la ingredientoj:</u>



- Ajlo.
- Petroselo.
- Laŭro.
- Kariofilo (2 pecetoj).
- Ajleroj: 3
- Kikeroj (500 gramoj)
- Tomato.
- ½ verda kapsiko.
- Cepo.
- Akvo.
- Safrano.
- Kelke da rizo.
- Vino
- Salo

<u>Jen la preparado:</u>

1. Oni devas trempi la kikerojn almenaŭ dum 12 horoj antaŭ ol komenci prepari la recepton.

2. Boligu, ne tre intense, la kikerojn kune kun petroselo, laŭro, kariofilo kaj ajlo.


3. Aliloke, haketu cepon, ajlerojn, tomaton kaj verdan kapsikon.

4. Friktitu la haketaĵon (cepo+ajlero+tomato+pepsiko). Aldonu iom da blanka vino kaj safranon.


5. Boligu, ne tre intense, kikerojn kaj haketaĵon dum kelke da tempo.

6. Dudek minutoj antaŭ ol fini la preparadon aldonu kelke da rizo kaj salon. Kiam la rizo malmoliĝos la recepto jam estas preta.

Ĉi-recepta vortaro:




Kikeroj




Tomatoj




Verda Kapsiko




Rizo




Cepo



Ajlo / Ajlero




Laŭro




Safrano



Salo



Petroselo



Kariofilo



Blanka Vino

Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

La antikva Psikatria Hospitalo de Sevilo


Se vi alvenas al la urbo Sevilo per-trajne el Madrido aŭ Kordovo verŝajne la unua vidaĵo kiu aperas maldekstren en la urbo estas ruinigita konstruaĵo. Tiam stariĝis la antikva psikiatria hospitalo de *Miraflores*, ĝuste apud la kvartalo *Pino Montano*. Kiel ĉiuj aliaj tiaspecaj sanejoj, ĝi funkciis en Hispanio ĝis la 9-a jardeko pasint-jarcente.



La Psikiatria Hospitalo ekfunkciis en la jaro 1890 kaj iom post iom la konstruaĵo pligrandiĝis, ĝis la jaro 1960 kiam okazis la lasta pliigo, ene de ĝi troviĝis foje eĉ pli ol 1.500 homoj. Kiam la hospitalo fermiĝis nur malgranda aro de gardistoj havis kiel funkcion kontroli la lokon por eviti ne-rajtigitajn enirojn. Krome, ne la tuta konstruaĵo fermiĝis, tiel kelkaj pavilonoj utilis kiel lokoj por gasti malzorgitajn infanojn kaj geknabojn, poste la Ruĝa Kruco malfermis malgrandan centron.

Jam dum tiuj jaroj gardistoj kaj laboristoj spertis malagrablajn sensacojn. Tiel, dumnokte, gardisto vidis, ke lumo estis ŝaltita ene de ĉambro fine de koridoro. Kiam li eniris en la ĉambron li aŭdis laŭte sian nomon kaj la pordo fermiĝis subite, kompreneble li foriris rapidege

kun terura timego. La plej stranga afero estis ke en la ĉambro ekzistis nek lampo nek ampolo.



Runigita ĉambro de la eksa Psikiatria Hospitalo de Sevilo, poste centro de la Ruĝa Kruco


Estas necese diri, ke la san-kondiĉoj en tiaj hospitaloj de la fino de la 19-a jarcento ĝis la mezo de la pasinta estis abomenindaj. Tie, troviĝis eĉ pli ol 1.500 homoj kiuj restis en la hopsitalo eĉ pli ol 10 jaroj. Dum tiuj jaroj estis tre ofte apliki al tiuj homoj lobotomiojn kaj elektroŝokojn, tio estas, kurento de 60 ĝis 90 voltoj pasis dum du deci-sekundoj tra la kranio.

La psikiatria hospitalo jam estas tute detruita, hodiaŭ nur restas la loko kie ĝi antaŭ stariĝis, tamen, kelkaj homoj asertas, post trapasi la lokon, ke ili aŭskultis bedaŭr-kriojn kaj alvokojn. Eĉ tiuj kiuj laboris ĉe la centro de la Ruĝa Kruco, konstruita apude poste, asertis, ke dumnokte estis eble vidi de tempo al tempo strangajn figurojn, lumojn kaj aŭskulti oftajn alvokojn.

Sendube sur la etoso de la eksa psikiatria hospitalo de Sevilo ekzistas forta emocio kaj psika ŝarĝo kaj tio, vole ne-vole, manifestiĝas per eksteraj signoj. Mi mem loĝis en tiu kvartalo dum du jaroj, ne tre malproksime de la antikva psikiatria hospitalo, tiam ĵus fermita, temis pri la jaro 1990. Mi memoras, ke mi devis uzi bus-linion kies haltejo ne troviĝis fore de tiu loko. Ĉiumatene, kiam mi atendis la alvenon de la buso, mi rigardis la lokon, dum tiuj jaroj ankoraŭ ne diskoniĝis la misteroj tie okazantaj, tamen la stranga nigreco de fenestroj kaj la etoso mem de la ĉirkaŭaĵo estis sencoj kiujn mi, vere, neniam forgesos.

J.M.

Speciala Krucvortenigmo pro la San-Izoligo (Kvaranteno)



Ĉi-numere ni prezentas specialan kruc-vortenigmon, iomete pli granda ĉar vi disponas pri pli da tempo. Nu, sur la kruc-vortenigmo videblas rideto, apud tiu optimisma mesaĝo ni deziras havigi al vi tre gravan konsilon, kiun vi sendube plenumas dum ĉi tiuj tagoj. La mesaĝo legeblas se vi sekvas la sagetojn, tio estas komencu per la kvadrato A1 kaj finu en A2. **KAJ NE FORGESU RIDETI !!!!**

HORIZONTALE

De A1 ĝis G1, sekvu ĝis G8, poste ĝis A8 kaj fine ĝis A2: speciala konsilo realigenda dum ĉi tiuj tagoj. La mesaĝo aperas sinsekva, tio estas ne ekzistas liberaj spacoj inter vortoj. Por helpi vin ni aperigis kelkajn literojn.

2. Inverse, afrika lando.

3. Inverse, verba finaĵo. ☐ Sen la lasta vokalo, movo en ia directo. ☐ Sufikso por formi karesnomon.

4. Inverse, komponu harmonian aranĝon de sonvibroj por teksto.

5. Simbolo de la aro de ĉiuj reelaj nombroj. ☐ Frazo kiu montras ĉefan ideon. ☐ Finaĵo de adverbo.

6. Sufikso montranta tion kio servas por efektivigi ion. ☐ Inverse, sufikso signifanta membron de grupo. ☐ Prepozicio signifanta: "en egalaj partoj, konsistantaj el..."

7. Rilata aŭ apartenanta al vi. ☐ Sen la lasta vokalo, vertikala kaj solida konstruaĵo.

8. Daŭriĝas la nepra konsilo kiu komenciĝis ĉe A1, legita laŭ la senco montrata de la sagetoj.

VERTIKALE

A. Daŭriĝas la nepra konsilo kiu komenciĝis ĉe A1, legita laŭ la senco montrata de la sagetoj.

B. Inverse, esti en facilanima kaj bonhumora stato. ☐Ĉina mezurunuo.

C. Sen la lasta vokalo, speco de bovo formortinta antaŭ kelkaj jarcentoj de kiu devenas ĉiuj rasoj de domaj bovoj. ☐ Inverse, pronomo. ☐ Sufikso montranta kunaĵon de elementoj.

Ĉ. En akuzativo formo, scienco pri la moralo. ☐ Finaĵo de nomoj.


D. Posedanta mensan viglecon kiu montras lertecon. ☐ Sur la aŭtomobiloj de Kamboĝo.

E. Inverse, sufikso esprimanta pasivon kaj ĝisfinan plenumon de la procezo. ☐ Sufikso uzata por indiki la abundecon de konsistiga elemento. ☐ Inverse kaj sen la lasta vokalo, korinklino al iu.

F. Esprimanta deziron aŭ volon, vundeti per korneca elkreskaĵo ĉe la ekstremo de bestaj aŭ homaj fingroj. ☐ Ricevo de io, por ĝin uzi dum difinita tempo, pagante interkonsentitan prezon.


D. G. Daŭriĝas la nepra konsilo kiu komenciĝis ĉe A1, legita laŭ la senco montrata de la sagetoj

Rebuso



- **Frukto kiu timigas nin fine de oktobro.**

Solvo al la pasintnumera Nuda Krucvortenigmo.



Solvo al la pasintnumera Rebuso.

- *Ĉu la afero iras bone ?*
  JES, EN ORDO

Sur la bildo aperis unue la vorto *JES.* Poste, ene de or-ingotoj aperis la litero D (do), tio estas: jes, en or' do = ***Jes, en ordo.***


HUMURO



aeu
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

Direcciones útiles del movimiento esperantista en Andalucía:

- ✓ En Málaga: angelarquillos@gmail.com
- ✓ En Sevilla: info@esperantosevilla.org
- ✓ En Córdoba: cordoba@esperanto.ac
- ✓ En Granada: granada@esperanto.ac
- ✓ En Ronda: arunda@esperanto.ac
- ✓ En la Axarquía malagueña: surlamar@hotmail.com



Nia celo: kunlabori en la fondiĝo kaj disvolvo de esperanto-grupoj en la tuta Andaluzio. Helpu nin !

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

★

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.
Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López
Vicprezidantino: Fátima Jiménez García
Sekretario: José María Rodríguez Hernández
Kasistino: María Dolores Torres Mateo
Voĉdonantoj: Jordi Lietor López
Carlos Spinola
Juan García del Río
Alejandro Burgos Escalante
Juan Díaz Casado

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
cordoba@esperanto.ac

TTT-paĝo: www.esperanto.ac
www.esperanto-andalucia.info
Blogo: www.andaluciaesperanto.blogspot.com

Aliaj utilaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net



Dum ĉi tiuj tagoj restu
hejme kaj ĝuu grandan
kolekton da verdaj filmetoj
en esperanto !!!

Vizitu: https: tubaro.aperu.net